

Raportas Kubo 9 novajn kazojn kaj neniun forpason de Covid-19



Havano, jun 8 (RHK) La nacia direktoro pri epidemiologio de la ministerio de publika sano de Kubo, dro. Francisco Durán, informis hodiaŭ ke je la fermo de tiu ĉi dimanĉo, oni konfirmis 9 novajn kazojn pozitivajn de Covid-19 por totalo de 2200 personoj kaj neniun forpasinton. El tiu ĉi totalo, 1 venis el eksterlando jam kontaktitaj kaj 8 okazis enlande.

Je sama dato, estas enhospitaligitaj por kontrolo epidemiologia 499 pacientoj. Aliaj 1642 personoj estas kontrolataj hejme tra la baza sanatento.

En tiu tago oni analizis 2048 samplojn, el kiuj 9 estis pozitivaj kaj la lando jam akumulas 120 536 studitajn samplojn kaj 2200 pozitivajn.

La novaj kazoj konfirmitaj estis kubanoj. El ili 6 estis kontaktoj de konfirmitaj kazoj. El ĉiuj konfirmitaj kazoj 89,7% estas kontaktoj de antaŭaj pozitivaj dum 156 el la kazoj venas el eksterlando. El la totalo konfirmita 1160 estis sen simptomaj.

El la novaj kazoj 5 estis viroj. El la 2200 pacientoj diagnozitaj, 247 restas enhospitaligitaj kiel aktivaj kazoj. La nombro da forpasintoj entute estas je 83, kun indikilo de morteco je 3,77% sub la nivelo de la amerika regiono. Kubo restas je la pozicio 18 rilate la mortec-indikilon en la regiono. Restas la nombro da du eksterlandanoj evakuitaj al siaj respektivaj landoj kaj 1868 jam

rekuperi?intaj (6 pliaj hiera?). Neniu paciento estas en kriza stato kaj 3 en grava stato.

?is sama dato la mondo akumulas pli ol 6 milionojn da konta?itoj pro tiu ?i malsano kun indikilo de morteco je 5,83 % dum la amerika regiono havas proksimume 48,0% el ?iuj kazoj en la mondo. La nombro da konfirmoj estas pli ol 3 milionoj. La nombro da forpasintoj en la regiono montras indikilon de morteco je 5,51%.

Spite al la favora evoluo de la malsano en Kubo, Havano i?is dum la lastaj tagoj, centron de la epidemio, pro ne korekta plenumo de socia distanci?o kaj tial la a?toritatuloj insistas pri la bezono plu gardi la socian izoli?on por eviti revigli?on de la nova kronviruso. Pri tio la havanaj a?toritatuloj pli strikte kontrolas la sekurecajn regulojn epidemiologiajn. En 12 kubaj provincoj oni ne raportis kazojn dum la lastaj du semajnoj.

Dume la kuba registaro pritaksas la evoluon kaj jam preparis strategion por iri al rekuperi?o kio estos anoncita ?i-semajne se la evoluo estas favora.

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/225043-raportas-kubo-9-novajn-kazojn-kaj-neniun-forpason-de-covid-19>



Radio Habana Cuba